

VERDA FAMILIO

NEPRAVIDELNÝ dvojjazyčný zpravodaj Esperantského kroužku v Mnichově Hradišti, pro členy kroužku a příznivce mezinár. jazyka.

Odpovědný redaktor – MUDr. Josef Hradil, 29501 Mn. Hradiště č.1161

Cena – dobrovolný příspěvek. Konto st. spořitelny v Mladé Boleslavi 533650-188

Povolil ONV Mladá Boleslav, odb. Kultury 47/87-403/16

[illegible][illegible]

77-a Universlala Kongreso de Esperanto la plej granda ĉijara solenaĵo de ĉiuj esperantistoj – okazis en Vieno 25.VII.-1.VIII. En Ĉeĥoslovakio ni rigardis ĝin kun eta sento amara, rememorante, ke ĝi estis origine planata al Prago kaj ne realiĝis pro nesufiĉa subteno de niaj oficialuloj el financaj kaŭzoj. Ĝi estis vera solenaĵo, ĉar partoprenis en ĝi pli ol 3000 pagantaj esperantistoj. Tio signifas la plej fortan Universalan Kongreson en postmilita tempoperiodo en „landoj“. Dum la solena inaŭguro sabate la 25an de julio prezidanto de Loka Asista Komitato H. Maitzen emfazis, ke „post la falo de muroj de miljaroj“, kiun ni spertis en Eŭropo ekde la jaro 1989, la kontraŭstarigo „oriento-okcidento“ ekperdas sian sencon. La inaŭgura solenaĵo okazis en impona kaj teatrece duonluma salono „Zamenhof“ de la kongresejo, kie proksimume 2500kapa ĉeestantaro ĉiuminute spertis la modifigon de eŭropa realaĵo, kiu ne povis ne influi nian esperantan scenon.

77. Světový kongres Esperanta – letošní největší svátek všech esperantistů – byl uspořádán ve Vídni 25.VII.-1.VIII. V Československu jsme na něj pohlíželi tak trochu s hořkým pocitem, protože původně měl být uspořádán v Praze a neuskutečnil se pro nedostatečnou podporu našich oficiálních činitelů z finančních důvodů. Byl to skutečný svátek, protože se zúčastnilo víc než 3000 platících esperantistů. T.zn. nejsilnější světový kongres v poválečném období v „západních zemích.“ Při slavnostním zahájení v sobotu 25.července zdůraznil předseda Místního organizačního výboru, že „po pádu zdí tisíciletí“, který jsme zažili po r.1989, stavení do protikladu pojem „východ-západ“ ztrácí svůj význam. Zahajovací slavnost byla uspořádána v působivém a divadelně poloosvětleném sále kongresové budovy „Zamenhof“, kde asi 2500 přítomných v každé minutě cítilo atmosféru evropské reality, která nemohla neovlivnit naše esperantské dějiště.

Pluraj paroladoj aludis la tumultajn okazaĵojn, kiuj plagas regionojn situantajn ĉe la sojlo de la kongreslando. Pluraj landaj asocioj havis okazon saluti kongreson je la unua fojo – ĉu ĉar ilia lando ĵus sendependiĝis, ĉu ĉar antaŭe mankis al ili eblo alveturi la kongresajn landojn. En siaj enkondukaj vortoj prezidanto de UEA prof. John Wells emfazis, ke Vieno, kies ĉarmon kaj miton ni persone spertis dum semajno ankaŭ turisme, havas okazon vidi propraokule, ke Esperanto signifas ne nur tri iamajn Universalajn kongresojn (1924, 1936 kaj 1960), Zamenhof-monumenton kaj parkon, kaj Internacian Esperanto muzeon – oferojn iel historiajn – sed vivan kaj evoluantan realaĵon. La prezidanto de Aŭstrio Thomas Klestil, en sia laŭtlegita mesaĝo esprimis sian simpatian al esperantistoj, kiuj per sia strebo al lingva interkompreniĝo kontribuas al interpopola kaj interkultura proksimiĝo. - La alta protektanto de la Kongreso Heinz Fischer, prezidanto de la aŭstria parlamento, mem filo de esperantistaj gepatroj, esprimis la deziron, ke Esperanto estu ne nur historia memoraĵo i.a. (inter aliaj) de la laborista movado, sed ankaŭ ideo por la XXI-a jarcento. La ĝenerala direktoro de la Aŭstria Nacia Biblioteko s-anino Magda Stedl salutis la Kongreson en nomo de la Ministerio pri Scienco kaj esploro kaj en sia parolado elvokis la figurojn de famaj aŭstriaj esperantistoj, kiel iama federacia prezidanto Hanz Jonas kaj la fondinto de la Internacia Esperanto Muzeo, Hugo Steiner. Persone alparolis la Kongreson ankaŭ la estro de Viena UNESCO-Komisiono s-ro Mornadou Seck. Li substrekkis similecon inter klopodoj de UNESCO kaj UEA: ĉar militoj naskiĝas en spirito de homoj, en ilia spirito necesas batali kontraŭ ili. Fine de tiu ĉi parto, la hispana ambasadoro invitis la kongresanojn al la venontjara UK en Valencio.

Vice projevŭ se dotklo překotných událostí, které souží krajiny v sousedství kongresové země. Několik zemských svazů mělo příležitost pozdravit kongres poprvé – ať již jejich zem se právě osvobodila, anebo nebyla možnost do kongresové země přijet. Ve svých slovech úvodem předseda UEA prof. John Wells zdůraznil, že Vídeň, jejíž půvab a pověst budeme osobně moci zažít také turisticky, bude moci na vlastní oči vidět, že Esperanto neznamena jen tři někdejší Světové kongresy (1924, 1936 a 1960), Zamenhofův pomník a park a mezinárodní esperantské muzeum – záležitosti tak trochu historické – ale živou a rozvíjející se realitu. Rakouský prezident Thomas Klestil ve svém přečteném poselství vyjádřil své sympatie k esperantistům, kteří svojí snahou o jazykové dorozumění přispívají mezilidským a mezikulturním sblížení. - Vysoký kongresový protektor Heinz Fischer, předseda rakouského parlamentu, sám dítě esperantských rodičů, vyjádřil přání, aby Esperanto nebylo jen dějinnou památkou mezi jiným dělnického hnutí, ale také idejí pro XXI století. Generální ředitelka rakouské národní knihovny s-anino Magda Stedl pozdravila kongres jménem Ministerstva pro vědu a výzkum a ve své řeči vyvolala postavy slavných rakouských esperantistů jako např. svazového prezidenta Franze Jonase a zakladatele mezinárodního esperantského muzea Hugo Steinera. Osobně oslovil kongres také ředitel vídeňské komise UNESCO pan Mornadou Seck. Podtrhl podobnost mezi hnutím UNESCO a UEA: protože se války zrodily v mysli lidí, v jejich mysli je též nutno bojovat proti nim. Na konci této části, španělský vyslanec pozval účastníky kongresu na příští rok do Valencie na UK.

Mallonga muzika interludo agordis atentojn al la esenca kaj pensiga parto de la solenaĵo, parolado de Louis Zaleski-Zamenhof, la nepo de nia majstro, el kiu ni citas kelkajn erojn, kiuj denove pravas la aktualecon de la interna ideo, inspirinta la kreinton de nia lingvoj: La ĉefa fonto de miaj hodiaŭaj vortoj estas la „Preĝo sub la verda standardo, prezentita al la unua el viaj Universalaj Kongresoj, kaj „La Espero“, iĝinta intertempe la himno de via nobla movado.“ „Tiam FORTE STARAS MUROJ DE MILJAROJ KAL LA OBSTINAJ BAROJ INTER LA POPOLOJ DIVIDITA“ ankoraŭ ne pretis DISALTI ... Tute kontraŭe: nur kelkajn jarojn poste, dum la dua mondmilito, sekvis raba detruado de nia terglobo kaj ĝuste tiam troviĝis arkitektoj por konstrui ne nur figursencajn, sed realajn, palpeblajn murojn el betono kaj pik-drato, por apartigi kaj enfermi homojn, kiuj Dion malsame prezentis, kiuj de „alia raso“ estis kaj alian lingvon parolis. Dudek jarojn poste kolegoj de tiuj arkitektoj de la kontraŭhomaraj krimoj, rekomencis konstruadon de simile realaj kaj palpeblaj muroj por disigi homojn, kiuj malsamajn ideologiojn proklamis. Ambaŭfoje la muroj ekkrakis. Mi persone estis kiel enfermito kaj vida atestanto de detruo de tiuj ĉi muroj. La unuaj falis en sango, en sufero, en malamo; la duaj tamen falis en paco, en ĝoje, en retrovita amikeco. Ĝi permesu esperi, ke ankaŭ aliaj, ankoraŭ ekzistantaj muroj, figursencaj aŭ realaj, falos same en paco kaj ĝojo. PREĜANTE SUB LA VERDA STANDARDO, vi ĴURIS LABORI POR REUNUIGI LA HOMARON. La KOMUNA EŬROPA DOMO estu sen apartigaj muroj, nek internaj, nek periferiaj. Ni tien ne venu kun dogmoj de blinda fervoro! Ni esperantistoj laboru, por ke tiu domo fariĝu ero en la domaro de la GRANDA RONDO FAMILIA ...

Krátká hudební vložka naladila pozornost na hlavní a podnětnou část slavnosti, přednášku Louis Zaleski-Zamenhova, vnuka našeho mistra, z něhož citujeme několik částí, které znovu dokazují aktuálnost „vnitřní ideje“, která inspirovala stvořitele našeho jazyka: „Hlavním zdrojem mých dnešních slov je „Modlitba pod zelenou vlajkou, představená na prvním z vašich Světových kongresů, a Espera“, které se mezitím stalo hymnou vašeho šlechtného hnutí“.

Tehdy pevně stály zdi tisíciletí a vzdorující překážky mezi rozdělenými národy“ ještě nebyly připraveny se rozskočit... Zcela naopak: jen několik let později, během druhé světové války, následovalo loupežnické ničení naší zeměkoule a právě tehdy se našli architekti na konstrukci nejen symbolické, ale skutečných, hmatatelných zdí z betonu a osteného drátu, aby oddělily a uzavřely lidi, kteří Boha jinak představovali, kteří byli „z jiné rasy“ a mluvili jiným jazykem. Za dvacet roku potom kolegové těchto stavitelů protilidských zločinů, počali opět stavbu podobně skutečných a hmatatelných zdí na rozdělení lidí, kteří vyhlášovali nestejné ideje. V obou případech zdi praskly. Byl jsem při tom jako zavřený a přímý očitý svědek zkázy těchto zdí. První padly v krvi, utrpení a nenávisti; druhé však padly v míru, radosti, v opět nalezéném přátelství. To nechť dovolí doufat, že také jiné ještě existující zdi, symbolické nebo skutečné, padnou stejně v míru a radosti. Modliť se pod zelenou vlajkou, přísahali jste pracovat za sjednocení lidstva. Společný evropský dům budiž domem bez oddělujících zdí ať vnitřních, ať obvodových. Nevstupujmež tam s dogmaty slepé horlivosti. My, esperantisté, pracujme aby se tento dům stal částí v sídlišti velkého rodinného kruhu.

Tial, forĝante nun KOMUNAN EŬROPAN DOMON, la domon de la estontaj feliĉaj eŭropanoj, ni estu konaciaj hodiaŭ pri la spertoj de la historio: la popoloj estu libere unuiĝantaj, neniaj unuiĝataj. proponadi la servojn de la neŭtrala internacia lingvo. Ni esperu, ke ĝiaj centjaraj spertoj kaj „juneco“ konvinkos milionojn de uzantoj, tiel faciligante la EFEKTIVIGON DE LA BELA SONGO DE LA HOMARO.“

KONGRESA TEMO: Kiam falas muroj de mil jaroj: (vortoj el la poemo Sub verda standarto de Zamenhof); komuna eŭropa domo. - Dum la kongreso kreiĝis diskutaj rondoj, pritraktantaj la kongresan temon de ĉiuj flankoj dŭm multaj kunvenoj en diversaj salonoj. La diskutkvalito estis diversa, tamen la pritraktitaj problemoj estis interesaj kaj ankaŭ vi provu ilin memstare pripensi. Se vi kuraĝos, sendu vian opinion aŭ pritrakton de unuopaj problemoj kaj ni kelkajn el ili volonte publikigos, farante tiel ankaŭ nian malgrandan „kongresan diskutrondon“. - Jen la problemoj: Gorbaĉov lanĉis la revon pri komuna eŭropa domo – la sorto de la ideo en Sovetio. - Pri eŭropa geografio: Kio estas Eŭropo? Ĉu Islando, Madeiro, Kanariaj insuloj, Kartvelio, Azerbajĝano kaj aliaj periferiaj ŝtatoj? Influo de ilia kulturo je eŭropa kulturo. - Politiko: Ĉu eblas trovi komunan difinon de demokrateco? Kiel aspektos estonteco en Eŭropa Komunumo? Ĉu ĝi evoluos direkte al federacio? - Ekonomio: Ĉu eblas kunordigi ekonomion de 12 EEK-membroj kun tre diferencaj niveloj de ekonomia aktiveco de nove aliĝontaj membroj? Ĉu komuna valuto? Kiel plej taŭge helpi ekonomie al la landoj de orienta Eŭropo?

Proto tvoříc nyní Společný evropský dŭm, dŭm budoucích šťastných evropanŭ, buďme si vĕdomi zkušeností dějin: lidé necht' se sami spojujı́, nikdy sjednocování mocı́. Pro lepší porozumění lidí tvořících takové sdružení, pro dobré porozumění lidí náležejících k nestejným sdružením na zemi, pokračujmež s nabı́dkou neutrálnı́ho mezinárodního jazyka. Doufejme, že jeho stoleté zkušenosti a „mladost“ přesvědčí miliony budoucích uživatelŭ, usnadňujících tak uskutečnění krásného snu lidstva.

KONGRESOVÉ TÉMA: Když padají zdi tisíciletı́ (slova z básně Pod zelenou vlajkou Zamenhofa); společný evropský dŭm. - Během kongresu se vytvořily diskusní kroužky projednávající kongresové téma ze všech stran v mnoha schůzích v různých salonech. Kvalita diskuzı́ byla různá, přesto diskutované problémy byly zajímavé a také vy zkuste si je jednotlivě promyslet. Jestliže najdete odvahu, pošlete Vaše mínění ev. pojednání o jednotlivých problémech a my rádi některé z nich publikujeme a realizujeme tak naše malé “kongresové diskusní kroužky“. Zde jsou problémy: Gorbaĉov podnítil sen o společném evropském domě – osud myšlenky v Sovĕt. svazu. - Evropa geograficky: Co je Evropa? Island, Madeira, Kanárské ostrovy, Karveli, Azerbajžan a jiné perifernı́ státy? Vliv jejich kultury na kulturu evropskou. - Politika: Je možno nalézt společnou definici demokracie? Jak bude vypadat budoucnost Evropského spoleĉenství? Bude se vyvíjet přímo k federaci? - Ekonomie: Je možno sladit ekonomikı́ 12 E. členŭ s velmi rozdílnými úrovněmi východoevropských zemı́ ekonomické aktivity nově se připojujících členŭ? Společná měna? Jak nejvhodněji ekonomicky pomoci zemím východní Evropy?

Socio: Ĉu entute eblas konstrui unu tuteŭropan socion? Ĉu unuavice ŝtatano nacia aŭ duagrade eŭropa civitano? Kiel forigi etnajn najbarajn kverelojn kaj krei harmonian familion? - Lingvo: Ĉu la disfalo de Sovetio revokas problemon de urĝa solvo de la internacia lingvo? Kaj per kiuj lingvoj la eŭropaj ŝtatoj traktu inter si? Konkurenco de la angla lingvo – nuntempa situacio. Naciismo, internaciismo kaj sennaciismo en la estonta Eŭropo.

Honoraj membroj de UEA: Kun ĝojo ni povas informi, ke inter la novaj honoraj membroj de UEA ĉi jare proklamitaj troviĝas du Ĉeĥoj: Jaroslav Mařík el Prago kaj Josef Vondroušek el Brno. Ili akceptu nian koran gratulon!

Novaj komitatanoj „C“ – elektitaj de komitatano „A+B“. La elekto atestas pri populareco de unuopaj kandidatoj. Voĉdonis 33 komitatanoj. La rezulto: Detlev Blanke (28 voĉoj Germanio) - P. Branco 21 Portugalio – B. Cassini 18 (Italio), B. Despinay 27 (Francio) – Hugimoto T. 18 (Japanio) – S.mcGill (Hungario 25) – J. Saheb-Zamani 20 (Irano) – S.Gilaŭ 27 (Koreio) – Umedy Y. 25 (Japanio).

Slangaj lingvistaj terminoj, ŝerce uzataj en Esperanto:

KROKODILI – def. en PIV – paroli nacilingve en esperantista medio.

ALIGATORI – paroli en etnolingvo, ne estante gepatra al la interparolanto (Ekzemple ĉeĥo parolas kun franco angle en esp. medio)

KAJMANI – uzi etnolingvon, kiu ne estas tiu de la lando, en kiu oni troviĝas. Ekz. ĉino interparolas angle kun italo.

Gaviali – paroli en lingvo ne-komprenata de la ĉeestantoj, precipe Esperante inter alilingvuloj. Kvankam ne multe uzata, ĝi estas bone propagande uzata, ekz. se esp. socio post vizito de kunveno en la tramo interparolas e-e kaj la homoj cerbumas, per kiu lingvo ili babilas. Aŭ vi povas surstrate demandi esperante simplan frazon: Kie estas banko, poŝtoŝeĵejo – kaj vi povas ŝajnigi miron, ke la demandato komprenas kaj klarigu, ke vi demandis Esperante. (laŭ fontoj: Heroldo, Mařík, Howard).

Sociologie: je vůbec možno budovat celoevropskou společnost? Napřed občan národa a v druhé řadě evropan? Jak odstranit etnické sousedské rozpory a vytvořit harmonickou rodinu? - Jazyk: Vyvolá rozpad SSSR problém nutného řešení mezinárodního jazyka? Kterými jazyky mají jednat mezi sebou evropské státy? Konkurence angličtiny – nynější stav.

Nacionalismus, internacionalismus a beznárodnost budoucí Evropy.

Čestní členové UEA: S radostí můžeme sdělit, že mezi letos vyhlášenými novými čestnými členy UEA jsou dva Češi: Jaroslav Mařík z Prahy a Josef Vondroušek z Brna. Necht' příjmou naši srdečnou gratulaci!

Noví členové výboru „C“ – voleni členy výboru skupiny „A+B“. Volba svědčí o popularitě jednotlivých kandidátů. Hlasovalo 33 členů výboru. Výsledek: D.Blanke 28 (NSR) – P.Branco 21 (Portugalsko) – B.Gassini 18 (Itálie) – Barbara Despinay 27 (Francie) – Hugimoto T. 18 (Japonsko) – St.mcGill 25 (Hungario) – J.Saheb Zamani 20 (Iran) – Gilsu 27 (Korea) – Umeda 25 (Japonsko)

Slangové lingvistické termíny užívané žertovně v Esperantu:

Turismaj renkontiĝoj de E-klub N.Bor kaj Ĉ.Lípa havas jam sian tradicion. Denove plene sukcesis la ekskurso al la valo Peklo la 20an de junio. Venis 18 gesamideanoj kaj la socio survoje tre amuziĝis. Oni piediris 5 kilometrojn tra bela valo kun rokoj. Survoje oni eĉ havis okazon propagandi E-on inter ĉeestantaj skoltaj, kiuj proklamis sian scivolemon kaj ricevis broŝureton kun koncerna informoj. La klubo en N.Bor sub gvido de s-ano Karel Kratochvíl montras viglan agadon kun celkonscia amuzforma eduka programo. Oni sukcesis dum 24 regulaj kunvenoj en la sezono 1991/92 detale trastudi 15 lecionojn el la lernolibro de Věra Barandovská! Ankaŭ rememoro pri vizito de nederlanda samideanino kaj pri la ekskurso al ruino Tolštejn restos por la anoj neforgeseblaj.

E-klubo en Vítkovice apartenas ankaŭ inter tiuj plej viglaj. En la lokan gazeton DAR s-ano Sládeček regule sendadas artikolojn, diversmaniere interesajn, ĉiam kun noto pri E-o. La klubo denove organizas kurson por komencantoj. Ĉiu ano havas eblon prelegi kaj alimaniere kontribui por la programo. Efektiviĝis tradicia ekskurso al monto Čantoria, kie oni kunvenis kun polaj amikoj. S-ano Drahoš Kočvara kun granda peno kolektis fotojn de plimulto de monumentoj de Zamenhof kaj E-o en la mondo kaj eldonis ilin en malgranda libreto, kiu estas ĉe la klubo havebla. Konvena donaco por via eksterlanda amiko!

Konferenco de Ĉeĥa Esperanto Asocio okazos 23.-25.an de oktobro 1992 en Pardubice-Rybitví. La konferenco estas ĉiujare la plej granda labora asocia kunveno kun riĉa programo eĉ kultura. Ĝi estas okazo por interkonatiĝo kun E-funkciuloj kaj gesamideanoj el la tuta respubliko, por interŝanĝo de spertoj pri pormovada laboro kaj okazo por e-a konversacio. Ĉiu povas veni, kiu pagos por du tranoktoj kaj kompleta manĝo nur 230 Kčs. Nepre aliĝu ĉe V.Podhradská, 60300 Brno, Poříčí 1.

Konference Českého esperantského svazu bude 23.-25.října 1992 v Pardubicích-Rybitví. Konference je každoročně největší pracovní schůzí svazu s bohatým programem i kulturním. Je příležitostí pro seznámení s e-funkcionáři i samideány z celé republiky, pro výměnu zkušeností o práci v hnutí i k esperantské konversaci. Každý může přijít, kdo zaplatí za dva noclehy a kompletní stravování jen 230 Kčs. Určitě se přihlaste u Věro Podhradské, 603 Brno, Poříčí 1.

Turistická setkání E. klubů N.Bor a Ĉes.Lípa mají již svoji tradici. Opět měl krásný úspěch výlet do údolí Peklo 20.června. Přišlo 18 samideánů a společnost se cestou velmi dobře bavila. Šlo se pěšky 5 kilometrů krásným údolím se skálami. Cestou byla i příležitost propagovat E-o mezi přítomnými skauty, kteří prokázali svou zvědavost a dostali brožurku s příslušnými informacemi. Klub v Novém Boru pod vedením s-ano Karla Kratochvíla prokazuje živou činnost s cílevědomou zábavnou výchovnou náplní. Dokázali během 24 pravidelných schůzek sezony 1991/92 podrobně prostudovat 15 lekcí učebnice Věry Barandovské! Také vzpomínka na návštěvu holandské samideánky a na výlet na zříceninu Tolštejna zůstanou pro členy nezapomenutelnými.

E-klub ve Vítkovicích patří také mezi nejčilejší. Do místního časopisu DAR s-ano Sládeček pravidelně zasílá různě zajímavé články vždy s poznámkou o E-u. Klub opět organizuje kurs pro začátečníky. Každý člen má možnost přednášet nebo jinak přispět k programu. Uskutečnil se tradiční výlet na horu Čantoria, kde se konala schůzka s polskými přáteli. S-ano Drahoš Kočvara s velkým úsilím sebral fotky většiny pomníků Zamenhofa a Esperanta ze světa a vydal je v malé knížce, kterou můžete dostat na adrese klubu. Je to vhodný dárek pro Vašeho zahraničního přítele!

Se vi volas publikigi vian sciigon al esperanta publiko en Verda Familio, afable respektu malgrandan amplekson de nia bulteno kaj la redaktformon: 1.III. - 1.VI. - .IX. - 1.XII. Tamen vian sciigon legos 1100 esperantaj legantoj!

Antaŭkongreso en Prago (20-23.VII) plene sukcesis kun riĉa programo de turismaj ekskursoj kaj vizito de kulturaj aranĝoj. Solena estis merkreda konferenco pri Komenio (22.VII), okazinta sub auspicioj de kultura ministerio, kiu forte subtenis ĝin disponigante la grandan salonon en Wallenstein-palaco (Valdštejnský p.). Malfermis ĝin sinjoro Prokop, vicministro pri kulturo, emfazis rolon de Komenio kaj dankis al UEA por porokazaj publikaĵoj pri K. - Drino Faranková-Barandovská parolis pri persono de K. kaj lia vivsorto. - Ĉefan paroladon prezentis prof. Dro Vl. Novobilský: Pri K. kaj interlingvistiko. Per ĝi li lumigis historian proponon de K. pri la ideo de Internacia Lingvo. Prof. Giordano Formici el Italio en bela Esperanto prelegis pri la filozofio kaj religio de Komenio. Kosmologio de K. estis influita de Paracelsus kaj alkimio. La prelegento mem majstras la vivrakonton de K. Li tradukis „Via lucis“ kaj „Panglottia“ en italan lingvon. - Okaze de la konferenco estis la partoprenintoj enmanigita el la presejo ankoraŭ varma libro de František Kožík: Lumo en tenebro, kiu estas ankoraŭ havebla ĉe la Asocio en Prago – nepre ĝin aĉetu!

1-a Mondkongreso de Esperantistoj-Handikapuloj en Františkovy Lázně okazis en la tagoj de la 18-a ĝis la 25-a de julio 1992: Partoprenis en ĝi 70 kongresanoj el 8 landoj (la plej foraj el Usono kaj Kanado), kiuj fondis internacian esperdonan asocion asocion, uzantan Internacian Lingvon. La programoj plenigis multaj paroladoj, kulturaj aranĝoj, florkrometado kaj enplantado de ornamarbetoj ĉe memortabulo de LL Zamenhof en urba parko, arta vespero ktp. Dum ekskursoj la kongresanoj amikiĝis kaj kreis amikan kolektivon. Oni referis pri zorgo pri handikapuloj en diversaj ŝtatoj. Pri la sukceso de la kongreso atestas la vortoj de la blinda kanadano Jean Sorel: „Mi jam nun komencas ŝpari monon por povi eĉ venontfoje alveturi kaj kongresi.“ Niaj legantoj, kiu volas partopreni en vigla sekcia vivo de handikapuloj skribu al la organizanto Josef Vaněček, P.K. 63, 27401 Slaný.



Eventoj la nova dusemajna gazeto kun movadaj novaĵoj – 8 paĝoj – formato A4 – 13 Kčs red. p.k.87, H-1675 Budapest – antaŭ pagebla ankaŭ ĉe inĝ Vlad. Dvořák, Ĉeĥa Esperanto asocio, Praha 1, Jílská 10.

K I E L D I R I ? Lantaigne: Praktika Esperanta Frazologio. - Temo: Komerco:

MERKATO de la lano, kafo. La Eŭropa Merkato. Libere m. Nigra m. La sukermerkato estas saturita. Serĉi novajn merkatojn. Merkatesploro. Inuntdi merkaton per produktoj. Oferti je plej bonaj kondiĉoj. Negocaj aferoj. Kiel statas, iras la komerco? Ĝi stagnas. Konjunkturo. Makleristo. Kurtoĝo (= procentaĵo pagata al la makleristo). Borso pri kotono. Kurzo. Spekuli ĉe la borso. Spekulaj manovroj. Akcioj kvotitaj ĉe la borso. Komerca ĉambro. Faktorio. Staplo (= sklad zboží). Konsorcio. Eksporti. Bilanco de la eksterlanda komerco.

K o r e s p o n d i deziras: Mallongiloj (Zkratky): bk=bildkartoj; ĉt= ĉiu temo; d=deziras; iŝ = interŝanĝas; jj=jaroj; kol=kolektas; kor=korespondi; m=muziko; pm=poŝtmarkoj; tm=tutmonde.